

Bulgara **ESPERANTISTO**




1966

3

LAMENOJ

EL SOLIDA ALOJO

La produktado de lamenoj el solida
alojo, organizita surbaze de la
nuntempa teknika nivelo,
estas efektivigata
helpe de plej
modernaj ekipilaroj,
garantiantaj altan
kvaliton.



ENHAVO

	Paĝo
Ĉefartikolo. La agado de Bulgara Esperanto-Junularo (Spiro Donĉev)	1
Iv. Ŝivarov. Nur la silento estas glora	3
Penjo Penev. Dimitrovgrad	4
Ljudmila Arnaudova. Al la ondoj	4
Rosica Georgieva. Pro kio vi larmas, infan'	5

JUNA ESPERANTISTO

Dmitri Gorbuncov. La planedo iĝis pli proksima	6
Христо Драголов. Щастливи мигове в братска Унгарија	7

ORGANIZA VIVO

Дачо Динев Тонев, L. Kānĉeva, E. Daskalov	10
---	----

Kovrilpaĝo: Vidaĵo el urbo Ruse, kie okazos la I-a STELO-Kongreso.

Abonkotizo : jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro ; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14lv.

Reklamtarifo : 0,15 levoj por m²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv ; korespond-anoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto ; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Përmetit 7—II/10, Tiranë.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucureşti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



LA AGADO DE BULGARA ESPERANTO-JUNULARO

Por la bulgara esperantista junularo la jaro 1965 krom Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK) estis ankaŭ periodo de streĉa kaj fruktodona laboro lige kun nia interna kampanjo „1965-Jaro de Bulgara Esperanto-Junularo“. Ĝia celo estis ĉefe plivastigi, ampleksigi kaj riĉigi la agadon de BEJ, antaŭenpuŝi la penetron de Esperanto en ĉiujn tavolojn de nia junularo, digne kontribui al la JIK. Kaj la rezultoj montris ke por la junaj fortoj multo estas atingebla.

Malfermis la kampanjon n-ro 1 de BE, en kies kadroj kreiĝis nia presorgano „Juna Esperantisto“. Ĝi jam havas bonajn rezultojn kaj nelpas nian agadon. Oni kreis eksterlandan korespondan reton por „Juna Esperantisto“ (Rumanio, Jugoslavio, Italio, Hungario, GDR, GFR, USSR, Pollando, Svedio, Usono, Nederlando k. a.). Ĉe la lokaj societoj funkcias junularaj korespondantoj.

BEJ jam havas 2000 membrojn. Bone sukcesis la VI-a Festivalo en Dimitroŭgrad (1150 partoprenintoj), kiu estis la unua konkreta kriterio por nia agado, impulso, krea manifestacio en la belarto.

Unuafoje BEJ okazigis nacian laborbrigadon sur Vitoŝa-monto (80 brigadanoj). La brigado estis ero de nia intima kunlaborado kun la Komsomolo kaj aliaj neesperantistaj junularaj organizaĵoj. En Primorsko okazis Internacia Seminario kaj Feriosemajno kun diskutoj kaj ĉarmaj ferioj en internacia medio ĉe nia mondfama Nigra Maro.

En nia iama ĉefurbo Veliko Târnovo estis organizita la unua nacia studenta Esperanto-renkontiĝo. Ĝi influis al plifortigo kaj stabiligo de la studenta movado en Bulgario (partoprenis reprezentantoj el Sofio, Ruse Plovdiv, Varna, V. Târnovo kaj Sviŝtov).

La anoncita Tutlanda junulara konkurado pri difinitaj indikaĵoj siaspece plivigligis la societojn. La rezultojn BEJ anoncos post la Festivalo, en Loveĉ ĉ. j., sed inter la imitindaj societoj jam ni povas montri la jenajn: Vraca, Sofia Studenta E-Societo „V. Peeva“, Mihajloŭgrad, Ruse, Dimitroŭgrad, P. Trâmbeŝ, Haskovo, Pârvomaj, Varna k. a.

Fervore nia junularo kolektadis subskribojn por la Propono al UNO. Ekzemple nur „V. Peeva“ ĝis 31. XII. 1965 transdonis al BEA ĉirkaŭ 80,000 kolektivajn kaj 50,000 individuajn subskribojn. La kolektado daŭros ĝis 30. VI. ĉ. j.

Esperanto estas instruata en junularaj medioj. La Lerneja Fakoj gratulas tiurilate la ekzemplon de Mihajloŭgrad, Vraca, „V. Peeva“, Pârvomaj, Velingrad, Jambol, Ruse, Dimitroŭgrad k. a. En Druŝevo la gekursanoj plej parte estis junuloj.

La Informa Fako estis organizita fine de 1965 ĉe „V. Peeva“ kaj tuj komencis la laboron, promesante bonan rezulton. Aperis multe da artikoloj pri ĉiuj ĉefaj aktivecoj de BEJ en nia centra kaj loka gazetaro, pri UEA-agado, TEJO k. s. Radio-Televido Sofio, Radio Moskvo kaj Varsovio dediĉis programerojn pri BEJ-aranĝoj. Okazis belaj ekspozicioj en Dimitrovg-rad, Ruse, Vraca k. a.

La kunlaboro de BEJ kun la neesperantistaj junulaj organizaĵoj estas rezultodona. La junulaj grupoj kaj studentaj societoj de BEJ sekvas tiun vojon. „V. Peeva“ subskribis eĉ kontrakton por kunlaborado kun la Sofia Interklubo, ĝi verŝajne baldaŭ fariĝos ano de la Studenta domo de la Kulturo en Sofio. BEJ kaj STELO havas konstantajn kontaktojn, ni eldonis du n-rojn de „Studento“.

La Eksterlanda Fako de BEJ regule kontaktas kun la LS de TEJO en Jugoslavio, Nederlando, Hungario, Italio, Francio, Svedio, Pollando, Usono; kun junularaj E-centroj en USSR, Rumanio, Greklando, ĈSSR. BEJ reprezentigis preskaŭ en ĉiuj gravaj E-aranĝoj en GFR, Aŭstrio, Pollando, Hungario, Italio, Jugoslavio k. a.

La Koresponda Servo ankaŭ estis reorganizita antaŭ nelonge.

La Estraro de BEJ havis en 1965 tri plenkunsidojn — Sofio, Dimitrovg-rad, V. Târnovo. En Sofio kreiĝis Kunlaborantaro ĉe „V. Peeva“. La Sekretariato havis 11 laborkunsidojn. B. Leonov, D. Jdrakov, E. Keremidĉiev, J. Angelov, A. Kerkin vizitis plurajn lokajn junulajn kaj studentajn societojn.

Kaj la perspektivoj por 1966 — VII Festivalo en Loveĉ; II Laborbrigado en V. Târnovo; Seminario de STELO en Torun, Pollando; 22-a TEJO-Kongreso en Pécs, Hungario; STELO-Kongreso en Ruse, Bulgario; eksterlandaj aranĝoj de landaj sekcioj de TEJO . . . Streĉoplena laborado, novaj taskoj kaj pluaj postuloj, renkontiĝoj, daŭra agado laŭ la vojo de nia enlanda movado. Sed la junularon ne timigas la laboro, la taskoj, la estonto. Bulgara Esperanto-Junularo pli kaj pli maturiĝos, disfloros kaj ekzistos kiel landa sekcio de TEJO, kiel junulara sekcio de BEA kun riĉa kaj varia agado.

Al novaj sukcesoj, karaj junaj geamikoj!

EL LETERO DE SOVETIA ESPERANTISTO

Estas kortuŝe ricevi saluton de samideanoj el frata lando, kiuj faras tiom da grandaj sukcesoj en ĉiuj kampoj de la konstruado de l'socialismo, el frata lando, kie Esperanto-agado tiom bone prosperas kaj prosperas precipe en la porpaca batalo. Estas rimarkinde, ke per la ricevitaj salutoj de l'bulgaraj samideanoj ne nur sole de via grupo (s-to „Verda stelo“), sed ankaŭ de „Vekiĝo“, „Roza Valo“ kaj „Nova Epoko“ ni eksentis en ĉiu gratulo la esprimon de frateca solidareco ne nur esperantistan, sed ankaŭ socialismokonstruan.

Ni, sovetiaj esperantistoj, devas pristudi la sperton de la bulgaroj en la Esperanta laboro. Nome de bulgaroj, ĉar el ĉiuj frataj socialismaj landoj la Bulgara Popola Respubliko estas „fortikaĵo“ de la esperantismo. Ni fieras pri tio. Mi multe kaj serioze interesiĝas pri la metodoj de via E-laboro, strukturo de BEA kaj MEM, kaj la kondiĉoj ĉe kiuj vi laboras. Krom tio, se vi povas helpi al mi en la akirado de E-libroj mi dankoplene akceptas tiun helpon.

*Ing. M. M. Ŝerĉenko
urbo Ust-Kamenogorsk*

NUR LA SILENTO ESTAS GLORA

(originala rakonto)

de Ivan Ŝivarov

Li estis mallberigita en ĉelo por mortkondamnitaj. Ordinare la ekzekutojn oni plenumis ĉirkaŭ matenkrepuskiĝo. Li aŭskultis kun streĉita atento kaj atendis la fatalan momenton. Sed la paŝobruo de la provoso iom post iom malproksimiĝis, kaj tio signifis, ke la vivo de la kondamnito daŭros ankoraŭ unu tagnokton . . .

Kiam la unua sunradio penetris en la ĉelon, la kondamnito fiksrigardis la pordon, sur kiu estis skribite: „Eble oni ne ekzekutos vin“.

Ĉu la skribinto estis viva aŭ ne, tio ne gravas. Gravas nur la fakto, ke tiu filozofia penso vekas esperon en la koro. . .

Sur la malpura muro, per alia skribmaniero estis alia frazo: „Nur la silento estas glora“. Tiu ĉi slogano estis enĉizita per klingo ne nur unu fojon, sed multfoje — ĝuste kvarcent-sepdek-okfoje. Atendante la plenumon de la mortverdikto, la kondamnito skribis konstante sur la muro.

Kiu estis tiu skribinto? Ĉu oni ekzekutis lin aŭ ne? Neniu sciis. . .

El la tuta surfaco de la muro restis ne surskribita nur malgranda kvadrato. Se la homo ne estus elĉeligita, verŝajne li estus skribpleniginta ankaŭ tiun ĉi kvadraton.

„Nur la silento estas glora,“ pense ripetis nun la mortkondamnito kaj sentis, ke novaj fortoj aperas en lia multsuferinta koro.

Kaj li rememoris kun fiero sian dignoplenan sintenon antaŭ la policianoj. Dum ili pridemandis lin, torturis lin, li silentis obstine. Dum la juĝenketo li silentis. Kaj antaŭ la tribunalo li silentis ankoraŭ pli obstine. Iam li ĵuris batali, li ĵuris silenti . . . kaj li plenumis la promeson. Li ne denunciis la partizanojn. Pro tio nun li estas certa, ke iu pensas pri li.

Peze paŝante, iu haltis antaŭ la pordo de la ĉelo. La malnovaj rustiĝintaj ĉarniroj ekgrincis.

— Eliru! Amnestiita vi estas — diris malĝentile la provoso, lasante la pordon malfermita.

„Amnestiita!“ — la mortkondamnito ripetis la vorton.

Sur lia pala nerazita vizaĝo aperis rideto. Do liaj kamaradoj faris ĉion eblan, por liberigi lin. Kaj jen li ĝisatendis la venkon. . .

Paŝante malrapide, li forlasis la abomenan ĉelon, ĵetante por lasta fojo rigardon al la pordo, sur kiu iu saĝa malliberigito estis skribinta:

„Eble oni ne ekzekutos vin“.

(Premiita en la Literatura konkurso)

KONVERSACIO

En iu aŭto, kiu funkcias kun cent kilometroj po hore.

La pasaĝero: Mi eniras la aŭton unuan fojon.

La ŝoforo: Mi ankaŭ.

INTER ALPISTOJ

— Kie vi pasigis vian libertempon?

— La unuajn tri tagojn en la montaro.

— Kaj la sekvantajn?

— La sekvantajn en la malsanulejo.

DIMITROVGRAD

de Penjo Penev

La urbo de Dimitrov
ne estas mara haveno,
nek font' kun akvo kuraca en sud',
ne estas montpinto,
nek limo,
ne estas batalfront',
nek institut'!

Sed ĉiam-
ĉiutage, ĉiujare —
lernantoj, soldatoj,
maristoj, pilotoj,
junpioniroj,
laboristoj
el minejoj kaj uzinoj
kun floroj
montaraj, ĝardenaj florkronoj—
kiel je festo
al tiu ĉi urb' venas,
samkiel fratoj
al sia propra frat'.
Ili venas por aŭdi, renkonti,
por vidi
la revojn de l' homoj
en riĉa florad'.
En la uzinoj, plenaj kun motoroj,
obstino kaj
homkoroj,

kie maturiĝis
kiel frukt', la kuraĝa kred' —
ili trinkas el la font' de la scipovo
por bone labori,
por batali
kaj vivi bonege.
Kaj kvazaŭ de potenca sun' lumigataj,
kun lipoj ridantaj,
kun hela rigard',
ili hejmen revenas inspirataj
etendinte flugilojn

al impeta flugad'.
Dimitrovgrad estas
fonto de juneco kaj fort',
inter hieraŭ kaj hodiaŭ —
fortika front';
por nia ĝojo vasta haveno —
landlimo vigla

el koroj kaj beton'!
Ĝi estas varma, viviga spir'
de niaj tagoj!
Ĝi estas pint' majesta
de nia rev'-inspir'!

Tradukis: *Veska Vălcanova*

(Premiita en la Literatura konkurso)

AL LA ONDOJ

de Ljudmila Arnaudova

Ondoj, ondoj, grizaj ondoj,
kien vi rapidas?
En nebulo de l' mateno
kion ja vi vidas?

Ĉu al la betulo blanka
sur la verda bordo
portas vi de l' akvo pura
sonorilakordojn?

Ĉu al ŝtono malserena
portas vi la flustron,
kaj impetas petoleme
al la ŝtona brusto?

Ĉu ŝipeton al la bordo
antaŭiri volas?
Ĉu la ŝaŭmon vi forportas
al insul' izola?

Sub la suno ŝprucoj flamas
kiel brilantoj,
sur ondkrestoj krispas ŝaŭmo
bordon karesante.

Apud la piedoj ĝoje
saltas vi kaj kuras,
pri fabeloj vi survoje
kantas kaj murmuris.

Viaj kantoj en la foro —
ŝercoj kaj fabeloj
ja elvokas en la koroj
nun ridetojn helajn.

Mi jam aŭdis viajn kantojn,
pro l' fabeloj ridis. . .
Ondoj, ondoj, petoluloj,
kien vi rapidas?

(Premiita en la Literatura konkurso)

KONGRESOJ 1966

Britujo. La jubilea 50-a Brita Kongreso de Esperanto okazos Pentekoston: 27—30-a de majo 1966 en Norwich, Norfolk, Britujo. Ali-landanoj ne devas pagi aliĝilon.

Francio. 5-a Kultura Semajno (1—8. IV.) en Gresillon, organizita de UFE sub la aŭspicio de la Ministerio pri Nacia Edukado.

PRO KIO LARMAS VI, INFAN'

de Rosica Georgieva

Subite sin rulis sur vango tenera —
mi vidis ĝi estis kristala et-larm'
de trista knabino kun digno fiero,
pro longa disiĝo, persisto kaj am'. . .

Ho, mia infano, pro kio vi larmas?
Kaj ŝajne vi ege ĉagrenas, knabin'!
Ĉu vi ne komprenas, ja kiom vi ĉarmas
pro via rideto kaj milda anim'.

Pro via pureco la belo ja fontas
kaj kantas mirinde birdet' sur arbust',
pro via laboro la pac' triumfonta
dekoros vin fine per gloro sur brust'.

Memore mi vidas. . . ja estis printempo,
elkreskis vi sola kaj fremda, infan'. . .
Vi ploris kaj ploris, sed nia nuntempo
kun sento amika etendas la man'.

Kaj vi ne ĉagrenu, senkulpa knabino,
ĉar ne plu turmenta atendas vin vag'. . .
Post multaj amaraj monatoj senfinaj
alvenis jam nia revita suntag'! . . .

(Premiita en la Literatura konkurso)

DIALOGO

Iu malsanulo iris ĉe kuracisto por esploro. La kuracisto diris:

— Mi ne trovas malsanon en via organismo, krom trolacecon. La plej bona medikamento por vi estas la rido. Ĝuste nun en nia urbo estas unu fama cirko. La klaŭno de la cirko estas tre komika. Iru kaj vidu lin. Li ridigos vin. Tio ĉi helpas vin.

La paciento klinis kapon kaj ekiris. La kuracisto akompanis lin, kaj diris:

— Antaŭ ĉio ne forgesu iri en la cirkon por vidi la klaŭnon.

— Mi multe deziras vidi lin, sed tio ĉi estas nebla.

— Kial? — demandis la kuracisto.

— Ĉar mi estas la klaŭno.

Tradukis:

D-ro A. Berovski

INTERNACIA KORESPONDAĴO

Amikiĝo de jugoslaviaj kaj bulgaraj Esperanto-societoj

Post la 18-a Kongreso de la Jugoslaviaj esperantistoj, kiu okazis en 1965 en Rijeka, k-do Iv. Šivarov el Plovdiv kaj k-do Dimitri Bjelanoviĉ el Beograd interŝanĝis kelkajn leterojn. Ĉar la temo pri kiu ili korespondas (Bulgara-Jugoslava amikeco) estas interesa, ni faras citaĵon el la letero de D. Bjelanoviĉ.

„Dankon al Via letero, pri kiu vi posedas kelkajn ideojn por nia estonta kunlaborado. Mi estas ĉiam preta helpi al la interkompreniĝo inter la du najbaraj landoj ne nur laŭ la linio de Esperanto, sed ankaŭ laŭ la linio de socialismaj principoj, pacpolitiko kaj ĉio kio utilas al nia alproksimado sur ĉiuj niveloj. Ekde la Kongreso en Rijeka ni ankoraŭ ne faris grandajn unuajn paŝojn en kunlaboro kun BEA kaj JEL. Sed jam estas tre necese fari paŝojn en tiu direkto — komenci labori kaj interŝanĝi sperton kaj rezultojn ne nur en Esperantaj problemoj, sed ankaŭ en aliaj kulturaj aferoj, kiujn niaj du organizaĵoj povus fari estonte laŭ siaj eblecoj k. t. p.

Vi povas fari en Plovdiv proponon pri kunlaboro inter kelkaj Esperanto-societoj en nia lando, kaj mi pere de „Suda Stelo“ faros informon laŭ via ideo de ĝemeliĝo inter esperantistaj societoj de Jugoslavio — Bulgario.

Laŭ mia opinio neniam en la pasinteco estis tiel necese havi bonan kaj ĝustan interkompreniĝon kiel nun en la atoma epoko kiam la homaro tage kaj nokte troviĝas sub Damokla glavo, sed klara kaj bona interkompreniĝo evitigos atoman katastrofon por la homaro, kiu povas malaperigi la nunan homaron en la mondo.

Korajn salutojn al via estimata familio, al ĉiuj geesperantistoj de Plovdiv, al ĉiuj bulgaraj geesperantistoj.

Via sincera amiko

Dimitri Bjelanoviĉ

JUNA ESPERANTISTO

LA PLANEDO IĜIS PLI PROKSIMA

Vivi oni povas ĉiamaniere. Oni estas ordinaraj vivuloj, kiuj penas kompreni historievoluon laŭ knaro de sia palisara pordeto. Por certa tempo oni povas iĝi batalanto, veninte al barikadoj pro mobilizo. Fine oni estas batalantoj laŭ sia naturo, laŭ konsisto de sango, laŭ deveno.

Ĝuste tiaj estas la plejmulto de la anoj en nia klubo, inter kiuj ne malmultas ankaŭ esperantistoj. Por ili ne sufiĉas sole sekvi eventojn de la planedo, studi lingvojn, ĝui la vivon. Ili volas, ke por ĉiu siberiano mondaj problemoj estu niaj problemoj; ili ne povas trankvile vivi, kiam eksplodas bomboj kaj malsatas homoj. Ili verve revas kaj agadas por la tempo, kiam ĉiu juna siberiano posedos Esperanton.

Kaj venas rezulto — laŭ populareco en la ĉefurbo de Altaj — Barnaulo — Esperanto superis germanan, francan kaj polan lingvojn. Nur al kurso de angla lingvo enskribiĝis iom pli da homoj.

Sed ja Internacia Klubo „Voshod“ ekzistas eĉ ne unu jaron (ĝi estis organizita de junaj ĵurnalistoj kaj esperantistoj baldaŭ post la Tutmonda Forumo en Moskvo de la junularo kaj studentoj).

Ĝi estas sola klubo en Sovet-Unio, kiu ekzistas ĉe gazeto. Ĝi

havas statuton, emblemon (vidu apude) kanton. Ĉe „Voshod“ laboras kelkaj sekcioj, inter kiuj plej aktiva — la Esperanto-sekcio (E-klubo „Oazo“).

Unufoje en monato por „Voshod“ estas disponigata la tuta regiona junulara gazeto. Pri la populareco de tiuj specialaj numeroj pruvas la fakto, ke post ĝia apero al la redakcio kaj klubo venas ĝis kvindek leteroj. Tion favoras ankaŭ la fakto, ke ni havas korespondantojn en ĉiuj kontinentoj (krom Antarkto). Inter ili estas konataj personoj, kiel „magelanoj de nia jarcento“ ĉeĥoslovakaj vojaĝantoj Irĵi Gancelka kaj Miroslav Zikmund aŭ japana filmoreĝisoro Kavakita Nagamasa, tiel simplaj homoj kiel oficisto Kuta el Kongo, franca komunisto Ĵak Ŝolter k. a.

Do, „Voshod“ ankoraŭ komencas „orbiti“. La vivon de altaja junularo ekde nun oni ne povas imagi sen la Internacia Klubo.

„De post la aperigo de „Voshod“ la planedo iĝis pli proksima“. . . skribis antaŭnelonge juna instruistino. Do, oni ne rifuzu al ŝi justemon.

Dmitri Gorbuncov
(kunlaboranto de „Juna Esperantisto“
por Siberio, USSR)



D. Gorbuncov



Vivu la 8-a de marto — internacia tago de la virinoj!

ЩАСТЛИВИ МИГОВЕ В БРАТСКА УНГАРИЯ

В купетата на малките русенски тацьори бе шумно. Вълнуваха ги много мисли — как ще ги посрещнат новите им приятели, как ще прекарат в Унгария. Но най-много ги вълнуваше мисълта как ще се представят на концертите. Най-после влакът спря на гара Солнок. Перонът ехтеше от песни, вееха се безброй червени връзки. Миг — и ние бяхме в прегръдките на своите приятели. Отведоха ни в пионерското градче с около 300 лагеруващи. Настаниха ни там. Дългото пътуване ни беше изморило, но за почивка и сън никой не мислеше. Всички ликуваха. Още от първия ден се почувствувахме като у дома си.

На другия ден групата бе официално приета в Дома на пионерите. Бяха дошли секретарят на ГК на партията, секретарят на областния комитет на младежкия съюз, председателят на градския народен съвет и всички, които ни бяха гостували в България. С приветствено слово към групата се обърна Директорът на Пионерския дом др. Гюла. Срещата завърши с почерпка и размяна на подаръци. За увековечаване на дружбата ни с унгарските приятели ние им подарихме албум за град Русе.

Програмата на престоя на групата беше богата. Ние посетихме много предприятия, музеи, запознахме се със забележителностите на град Солнок. На другия ден ни предстоеше концерт. За гостуването ни окръжният вестник бе вече писал, радиовъзелът в града бе оповестил. Нашият танцов състав и съставът за народни танци при Дома на пионерите в Солнок, носител на два златни медала, бяха отведени във Висшето военно училище за летци край града. И тук ни посрещаха и прегръщаха мили хора. Направихме разходка до летището, около самолетите, а след това разгледахме военния музей на училището.

Точно в 19 часа завесата се вдигна. Препълнената зала посрещна нашия състав с нестихващи ръкопляскания. Още след първия танц зрителите станаха прави, ръкопляскаха и в продължение на няколко минути не дадоха възможност на танцьорите да напуснат сцената. Редяха се едно след друго изпълненията на нашия и унгарски състави. Накрая военното командване поздрави нашата група и ѝ поднесе подарък.

На следващия ден ни предстоеше отново концерт. Към 14 часа нашият и унгарският състави потеглиха за град Мезотур (на около

50 км от Солнок). Няколко дни преди пристигането ни концертът бе оповестен с големи афиши. Разгледахме забележителностите на града, посетихме завода за порцелан и завода за производство на килими,

Голямата концертна зала трудно побра всички посетители. Заедно с двата танцови състава в програмата на концерта бяха включени и местни състави. Бяхме силно изненадани, когато преди концерта при нас дойде д-р Никифоров, началник на градската болница в Мезотур. Той сърдечно прегърна всички ни и поднесе на малките танцьори подаръци. И тук ни поздравяваха от все сърце. С особена любов се ползуваше най-малкият ни танцьор — десетгодишният Сашо, за когото бяха писали много. Накрая председателят на Градския народен съвет подари на групата възпоменателно флагче.

На петия ден от гостуването ни предстоеше нова изява. Бяхме поканени да участвуваме в концерта на р. Тиса. Непрогледна нощ бе паднала над града, но по бреговете на Тиса бе светло като ден. Като че ли целият 70-хиляден град бе дошъл на водния карнавал. От всички страни се кръстосваха прожектори, под чиито светлини водите на Тиса изглеждаха сребърни. Концертът завърши сред нестихващи ръкопляскания.

На другия ден групата ни отпътува за столицата, която отстои на 96 км от Солнок. Разгледахме някои забележителности на Будапеща. Пионерско влакче ни отнесе в международния лагер „Челеберц“. На пилоната сред пионерските знамена на СССР, Румъния, ГДР, Чехословакия, Дания, Норвегия и др. гордо се вееше и българското знаме.

Невероятно бързоминаха дните, изпълнени с радост, дните, прекарани в дружба. Ето ни отново с куфарите на гарата. И този път имаше цветя, и този път се вееха много червени връзки. Последни прегръдки, последни ръкостискания и пожелания.

Много километри ни разделят сега, но хубавата дружба остана завинаги в сърцата ни.

Хр. Драголов

завеждащ отдел при Дома
на пионерите — Русе,
ръководител на българ-
ската група в Унгария

Продължава се подписката за събиране абонати на „Bulgara Esperantisto“ за 1966 г. — п. к. 66, София.

Ni, subskribintaj geknaboj — geanoj de la Esperanto-rondeto „Fajrero“ ĉe la ok-klasa lernejo en Liemerī, distrikto Gulbene, Latvio, per ĉi tiu letero intencas informi vin pri nia E-agado.



E-rondeto „Fajrero“ en Liemerī

La 10-an de decembro 1965 en nia lernejo okazis E-vespero, dediĉita al Tago de Homaj Rajtoj, Zamenhof-tago kaj Tago de Libro. Pri ĉi tiu vespero informis ankaŭ la gazetaro. Nia loka ĵurnalo „Dzirkstele“ („Fajrero“) en Gulbene en la n-ro 151 (557) de 21. XII. 1965 publikigis informon, sur la unua paĝo. La artikolo priskribas nian protestan mitingon kontraŭ usona agreso en Vjetnamio, rakonton de nia rondetgvidanto instruisto Kubulnieks pri la kvara ĉebalta E- Tendaro kun projekcio de 40 fotoj, nian ekspozicion kaj artprogramon. Pri la fiagoj de la usonaj agresantoj en la Vjetnama Demokratia Respubliko informis instruisto O. Briddinš. Ĉiuj aŭskultis ankaŭ interesan rakonton de instruisto A. Kubulnieks pri du-taga kunestado kun la ambasadoro de la Vjetnama Demokratia Respubliko Nguyen van Kinh en la E-tendaro en Draveĵi.

Poste parolis la pionirgvidantino V. Krieva, la lernantino Dace Briedina, kiu legis ankaŭ

rezolucion. La partoprenantoj en la mitingo rigardis la ekspozicion, aranĝitan de la internacia klubo, en kiu estis videblaj libroj, revuoj, leteroj de la Vjetnama Demokratia Respubliko en Esperanto kaj ankaŭ sendaĵoj el la frataj respublikoj. La pioniroj kaj junuloj ricevis abundajn sendaĵojn de libroj kaj revuoj de Vjetnamio, per kiuj ili konatiĝis kun la vivo en VDR kaj kun la batalo kontraŭ la subpremantoj.

La junuloj kaj pioniroj sub la gvido de instruisto A. Kubulnieks ĝojigis ĉiujn per esperantlingvaj prezentaĵoj el la vivo de diversaj popoloj.

„Padonju Jaunatre“ („Soveta Junularo“) en n-ro 252 (5313) de 24. XII. 1965 publikigis artikolon „Amikeco — garantio por paco“.

Post la mitingo la partoprenantoj rigardis ekspozicion de la internacia klubo. Pri Zamenhof kaj Esperanto parolis Dace Briedina, Andris Melacis kaj aliaj. La plej bonaj Esperanto-deklamantinoj estis Dace Briedina kaj Inara Villa. Pri agado de nia rondeto parolis Maruta Pelece. Ŝi legis la plej interesan leteron, kiun ni ĝis nun ricevis. Ĝi estas letero de s-ano Ints Ĉaĉe, kiu rakontas pri sia esperantistiĝo kaj vivo. Li skribas pri tio, ke li renkontiĝis kun V. I. Lenin 18 fojojn, kaj inter tiuj 18 vizitoj tri estis dediĉitaj al Esperanto. Lia letero restos en nia Lenin-muzeo. La programo finiĝis per gaja kanto en Esperanto, kiun plenumis niaj junaj rondetanoj, akompanis ilin sur piano nia direktorino k-dino Gita Briedina. La administracio de la interkolhoza kokin-bredejo apud urbo Aluksne petis nian instruiston Kubulnieks prelegi pri Vjetnamio en ilia farmego. La prelego okazis la 27-an de decembro. Li informis la publikon pri la Baltlandaj Esperanto-Tendaroj, projekciis siajn fotojn kaj rakontis pri la Vjetnamia ambasadoro — esperantisto Nguyen van Kinh.

S-ano Kubulnieks daŭrigas siajn prelegojn pri Vjetnamio. Li uzas materialojn, ricevatajn per helpo de Esperanto.

Skribu al ni je adreso:

Esperanto-rondeto „Fajrero“, S. N. Marinkalns, Gulbenes rajons, Liemeru 8-g. Skola, Latvijas PSR, USSR.

NIAJ KUNLABORANTOJ

BERND WEBER — LEIPZIG, GDR

Entuziasmo, naskita la 19-an de novembro, 1938 en Guhraŭ, Silezio. Ek de 1945 loĝas en Leipzig kaj laboras kiel dentteknikisto. Esperanton lernas en 1957 kaj partoprenas unuan

fojon TEJO-UEA-kongresojn en 1958 (Okc. Germanio). Ek de tiam regule vizitas la internaciajn E-arangojn, lastfoje — la seminarion de BEJ en Primorsko.



La mondon ekvidas la 14-an de aŭgusto, 1944. Ŝatanto vera de artefaritaj lingvoj — unua lingvo, kiun li parolis estis kreita de li mem. Iom simila al Volapük, sed tute

originala. La modesta kapablulo eĉ ne nomis ĝin iel.

Nun li estas Ĝenerala sekretario de STELO, unu el la junaj „apostoloj“ en Rumanio kaj krome — studento pri elektroniko. Adrian Boldan estas landa reprezentanto de ILEF (Internacia Ligo de Esperantistoj—Kino-Foto-Magnetofon-Amatoroj). Jam kelkfoje — kara gasto en Sofio, Ruse kaj la lando.

NIAJ AMIKOJ. . .

. . . Ĉi vortojn skribas al vi via amiko Pierĝorgo D'Agostini kiu nun plue diligente studas en Bukureŝto. Pro la studado malofte mi trovas liberajn horojn, des pli ofte miaj pensoj direktiĝas al la esperantistoj-geamikoj el la Sofia studenta E-societo „Vela Peeva“ (SSES). Dank' al ili mi lernis ankaŭ Esperanton — tiun karan lingvon, kies ekzisto kaj aplikado kvazaŭ ŝlosilo faciligis min eltrovi pli da karaj kaj bonaj geamikoj ĉiupaŝe, ĉiuloke en Sofio

kaj la lando ĝenerale. Tial mi estas tre dankema al SSES-anoj; krome — se mi ne estus vizitinta la ĉarman Bulgarian, nun mi ne parolus la internacian lingvon. Do, dezirante al vi pluajn fruktodonajn sukcesojn, varmkore salutas vin via itala amiko.

D'Agostini Pierĝorgo

P. S. Aldone mi sendas korsalutojn je la nomo de la junaj geesperantistoj el Bukureŝto.

Sama

SCIIGO DE LA ESTRARO DE BEJ

Laŭ distribuado en la Sekretariato de la Estraro de BEJ en Sofio la jenaj estraranoj respondecas pri la ĉefaj aktivecoj en 1966:

1. Festivalo en Loveĉ — D. Ĵdrakov (sekretario de BEJ).
2. Laborbrigado — B. Leonov (viceprezidanto).
3. STELO-kongreso en Ruse — P. Todorov (estrarano de BEJ).

4. TEJO-kongreso en Pécs — E. Keremidĉiev (prezidanto).

5. Feriosemajno Primorsko — S. Donĉev (kunlaboranta sekretario).

6. Festivalo de MFDJ — D. Ĵdrakov.

Baldaŭ aperos sciigo pri la ĝenerala distribuado de la postenoj kaj taskoj en la Estraro de BEJ.

AFORISMOJ

* Akiru venkojn ne elverŝante sangon.

* La vortoj de la vero estas simplaj.

* Ni ne naskiĝis por malami, sed por ami.

* Silentado estas ornamilo por virino.

El „Esperanto—Informbulteno“
de Tesalonika E. Ligo

ЕСПЕРАНТСКОТО ЛЕТОВИЩЕ В С. ДРУЖЕВО

Започнах да уча есперанто през 1961/62 год. в задочните курсове на „Всестранни услуги“ — София. След това започнах да усъвършенствувам познанията си. У мен възникна мисълта да ръководя курсове по есперанто за граждани и ученици. Това не смеех да направя, защото не знаех как и къде да проверя знанията си. Узнах за есперантското летовище в Дружево. През 1965 год. получих съобщение, че Българският есперантски съюз и Българската есперантска кооперация уреждат курс в това село,

в който аз се включих.

На 18. VII. 1965 г. пристигнахме в летовището. Всички се чувствахме бодри, весели, щастливи. Въпреки че обстановката бе скромна, ние с радост и задоволство гледахме, че има спално помещение, столова. Освен това е построена нова сграда

ководител. Благодарение на неговата добра подготовка всичко вървеше гладко, имаше добра дисциплина, материалът се усвояваше леко. Дните се нижеха бързо, ние не ги чувствахме, дори искаше ни се да останем по-дълго време, имаше голяма задухшеност.

В лагера е тихо, спокойно, удобно и има възможност да учим и да се усъвършенствуваме в езика. Според мене Дружево е едно от най-удобните места, където българските есперантисти могат да повишат езиковите си знания.

А какво да кажем за жителите на Дружево? Те са хора добри, трудолюбиви, весели, гостоприемни. В продължение на 14 дена ние бяхме посетени няколко пъти от техните младежи и девойки. Не бяха безразлични към нас и ръководителите на селото. Много пъти те ни посещаваха, интересуваха се от нашите нужди. И тази година очаквам с нетърпение да отида в Дружево, където ще придобия необходимите ми и крайно полезни знания за езика.


Нека Дружево стане постоянно действаща школа за българските есперантисти. Нека вместо две смени да има повече смени. БЕС и БЕК трябва да направят възможното за осъществяване на това общо желание.

Дачо Динев Тонев
гр. Раднево

PAZARĜIK. La lernanta E-kurso ĉe la leĝejo „Hristo Botev“ denove komencis sian laboron je la 2. XI. 1965. En ĝi partoprenas 8 ĝelernantoj, kiuj lernas entuziasme la lingvon. Post la oka leciono ili jam skribis la unuajn leterojn al eksterlando.

La kurso daŭrigos sian laboron ĝis la fino de majo. Respondeculo de la kurso estas la sekretario de la leĝejo Georgi Georgiev.

Kursgvidantino: L. Kânĉeva



Stojan Terzijski, fondinto de la restadejo en Druĵevo

за занятия при лошо време. През времетраенето на курсовете лагерът бе електрифициран. Набавен бе радиоапарат, уреди се и библиотека. Летовището е разположено в подножието на „Дупни връх“. То е снабдено с вкусна вода. Въздухът е чист, приятен. Занятията се водеха няколко часа през деня. Преподавателят др. Симеон Хесапчиев е отличен ръ-

ORGANIZA SEMINARIO

Je la 16-a de januaro 1966 Iaŭ iniciato de la Distrikta komitato de BEA en Stara Zagora okazis organiza seminario por perfektigo de la esperantista aktivularo. La seminarion ĉeestis pli ol 25 personoj el Stara Zagora, Kazanlâk, Ĉirpan. Radnevo kaj Šipka.

Antaŭ la ĉeestantoj oni tralegis jenajn raportojn:

1. Historio de la bulgara esperantista movado — Petko Bonev.

2. Historio kaj nuna stato de la tutmonda esperantista movado — Ivan Doĉev.

3. La esperantista societo — kerno de nia movado — Jivko Kolev.

4. Kiel ni devas gvidi nian internacian korespondadon — Irina Markova.

5. La kulturkleriga kaj kulturamasa agado en la loka esperantista societo — Dimo Martinov.

6. Kiel ni devas gv di la societan kancelarion kaj dokumentadon — Slavi Janulov.

Post la prelegoj okazis viglaj diskutoj. Multaj reprezentantoj el diversaj societoj parolis pri sia organiza sperto.

La unua organiza distrikta seminario de esperantistoj en Stara Zagora finis plensukcese sian laboron.

Jivko Kolev

BJALA. La E-societo „Paco“ havas novan estraron: prezidanto Simeon Baltaĝiev, vicprezidanto Petko Vladov, sekretari-kasisto Stefan Kirov.

En la urbo funkcias du kursoj: en la Junpionira domo kun 12 lernantoj kaj ĉe industria kombinumo „Jantra“ kun 20 kursanoj. Kursgvidanto S. Baltaĝiev.

St. Kirov

MEZDRA. E-societo „Nikola Vapcarov“ organizis dum la pasinta jaro kurson por komentantoj; partoprenis 15 gekursanoj. Ili sukcese finis la kurson.

Ĉi-jare denove funkcias kurso por komentantoj. Partoprenas 12 geesperantistoj. Kursgvidantoj estas Anĉo Anĉev kaj Jordan Gruev.

Ĝis nun oni instruis 8 lecionojn kaj la gekursanoj jam faras siajn unuajn interparolojn.

A. Anĉev

ПЕРНИК. Есперантското дружество „Нов път“ организира курс за изучаването на есперанто. Петнаесет младежи и девойки под ръководството на Спиро Недялков започнаха да навлизат в тайните на езика.

Всички възприемат материала с лекота и обучението не затруднява лектора. Есперантското движение в Перник ще бъде попълнено с млади ентузиазирани есперантисти.



На снимката: Ръководителят на курса Спиро Недялков проверява как Виолета Костова е заучила непознатите думи.

Текст и снимка: **Ст. Янев**

VIL. TRUD, regiono de Plovdiv. Je la 1-a de februaro 1966 la E-societo „Paco“ okazigis jarkunvenon. Oni elektis novan estraron: Prez. Al. Dinkov Plaĉkov, sekr. Iv. St. Jankov, membroj: Nik. At. Ĉolakov, Nenĉo Pašov (eksinstruisto), Iv. St. Uzunov. Kontrola komitato: Dim. Stoilov Bogdanov, Stoil Rangelov Petkov, Georgi G. Dinĉev.

Iv. Jankov

RUSE. La ĉefartikolon „Kun rigardo antaŭen“ ni pridiskutis en kunveno de E-societo „Libero“, kiu okazis je la 28-a de januaro. Konekse kun la artikolo ni decidis akceli la kolektadon de membrokotizoj kaj abonigojn al „Bulgara Esperantisto“.

Dimi

La 14-an de februaro 1966 mortis en Ŝumen nia plej maljuna kaj malnova esperantistino

Elena Stefanova Koeva — 80-jara.

Ŝi estis multjara membrino de nia societo kaj pli ol 40 jarojn ŝi aktive laboris por la disvastigo de nia kara lingvo. Ĝis sia morto ŝi estis fidela agantino de la E-movado en nia urbo.

Eterna estu ŝia memoro!

Niajn kondolencojn al la funebranta familio.

Esp. societo „Vekiĝo“ — Ŝumen

ОТВОРЕНО ПИСМО

до всички преподаватели по есперанто

Драги колеги,

Всеки, който започва изучаването на есперанто, копнее да осъществи три главни неща:

1. Бързо и лесно да усвои езика.
2. Чрез кореспондиране да намери приятели в различни краища на света.
3. Да посети свои приятели в чужбина.

За да бъдат осъществени тези неща, първо-степенна помощ оказват ръководителите на курсове, преподавателите по есперанто, които от своя страна трябва да прибавят и четвъртото, може би несъзнателно изпуснато нещо от курсистите — качествено овладяване на езика.

От това, как преподавателят преподава своите знания, как той завладява сърцата на своите курсисти, зависи и стремежът и качеството на това изучаване.

За изпълнението на тази високопатриотична задача — да обучаваме съзнателни и езиково добре подготвени есперантисти, призовавам всички, които преподават есперанто, да се включат в почина „Образцов преподавател по есперанто“, като за целта се изпълнят показателите:

1. Всяка лекция в открит час — образцов урок.

2. Да се използват различни учебни методи.

3. Умело да се прилагат дидактическите принципи: активност, нагледност, достъпност, системност, последователност, научност, трайност.

4. Умело да се използват учебните помагала: учебник, речник, картини, табла, диаграми, списания, тебешир, магнетофон, диафилми, грамофон и т. н.

5. Да се създава любов в курсистите към есперанто, вяра в неговото бъдеще и полза, така че 80% от урока да се усвои още в клас.

6. Да се подпомогнат курсистите в тяхното съзнателно и задълбочено кореспондиране.

7. Да се провежда културно-просветна есперантска дейност.

8. Да се подготвят кадри за организационна дейност в есперантските дружества и младежки групи.

Убеден съм, че преподавателите ще се включат в почина.

Пишете ми за вашата педагогическа работа, как се усвоява езика от различните възрасти. Нека обменяме опит! Аз ще размножавам на циклостил вашите форми на работа, съвети и предложения в специален „Педагогически бюлетин“ и ще го изпращам до всички, които работят по почина „Образцов преподавател по есперанто“.

Нека всички преподаватели ми изпратят адресите си.

На работа, другари!

Еньо Даскалов

учител

Техникум по текстил

Враца

Отдел „Народна просвета“
№ IX- 4550 от 21. XI. 1965 г. Бургас

До директора на училището
гр. (с.)

Съвременните международни връзки и широкият културен и стопански обмен на нашата страна с други държави налагат необходимостта да се изучават в училищата и по самостоятелен път най-различни чужди езици.

Между тези възможности изучаването на международния език есперанто е едно благоприятно и полезно мероприятие. Езикът есперанто има много опростена граматика, богат речников фонд и логическо устройство на фразата, които го правят лесно усвоим. Благодарение на тези си качества много езиковеди и държавници са изразили своето положително и благосклонно отношение към този език и препоръчват неговото изучаване. В България също се изучава в много училища, а в Софийския държавен университет има открита катедра.

За изучаването му в училищата МНП е изготвило специална програма.

В Бургас изучаването му е още по-необходимо, тъй като нашите черноморски курорти се посещават от много чужденци, голяма част от които говорят и си служат с есперанто. Лесното усвояване на езика дава прекрасна възможност на голяма част от учащите се да го ползват в своите кореспондентски връзки с най-различни народи, с което се съдействува за тяхното комунистическо възпитание.

Във връзка с горното отделът препоръчва на директорите на училищата:

1. Там, където има възможност, незабавно да се открият кръжоци или да се въведе факултативното изучаване на есперанто.

2. Да се съдействува на преподавателите на местното есперантско дружество да включат учащи се и учители в изучаването на езика в техните форми.

3. Учителите, които следваха миналата година есперантския курс, да организират подобни курсове в своите училища поне с една паралелка.

Повече подробности по изучаването на есперанто ще получите от представител на местното есперантско дружество, който ще ви посети.

Н-к Отдел Народна просвета: Тр. Камаров

NIKOLA MIŠEV — KAMARADO

Antaŭ 65 jaroj en Bracigovo naskiĝis Nikola Jordanov Mišev, konata ankaŭ sub la pseŭdonimo Kamarado. Li estis de iruaj infanaj jaroj unua helpanto de sia patrino, ĉar la patro



mortis. Nikola tre frue komencis perlabori sian panon kaj spertis la sengoĵan sorton de servisto, poŝtisto en Peruŝtica, ministo en Pernik. Partoprenante la grandan ministan strikon oni persekutis lin kaj pro tio li revenis en Bracigovo. Kiel komunisto li aktive partoprenis la organizadon de la Septembra ribelo en 1923. Post la frakaso de la ribelo li estis arestita.

Komencante laboron de elektroteknikisto en elektrouzino „Vâca“ en 1934 Nikola estis sekretario de regiona komitato de Bulgara komunista partio. Poste en la Dua mondmilito li devis fuĝi al Rodopi-montaro trovante kontakton kun la partizana taĉmento „A. Ivanov“. Kiel partizano li estis modesta kaj modela komunisto kaj esperantisto. Kun partizanoj esperantistoj Todor Kolarov, Angel Ĉauŝev, Todor Ĉolakov el Batak, Vela Peeva kaj Stojko Kalpazanov el Velingrad, Boris Jivkov el Peŝtera, Djudjukov el Bjaga k. a. li praktikis la lingvon tiel lerte kiel dum

la paca vivo. Li korespondis kun rantistoj el la vasta mondo.

Li estis politika komisaro de la taĉmento „A. Ivanov“ ĝis la lasta tago de sia vivo. La 3-an de marto 1944 la faŝistaj eszekutistoj mortpafis lin kune kun grupo da partizanoj en Batak.

La modela vivo de Nikola Mišev — Kamarado kaj la hela rememoro pri la heroo kaj esperantisto restos neforgeblaj por ni. Ni neniam forgesos lin.

Renovigante la esperantan agadon liaj samurbanoj en Bracigovo donis la nomon Nikola Mišev — Kamarado al la Loka E-Societo.

Je la 23-a de januaro 1966 en Sofio mortis la fidela esperantistino **Saŝa** (Aleksandra) **Bencionova — Keremidĉieva**, edzino de Ivan Keremidĉiev — Esperov, konata ĵurnalisto kaj membro de CK de BEA, kaj patrino de Emil Keremidĉiev, membro de la Estraro de CK de BEA kaj Prezidanto de la Junulara Sekcio ĉe BEA.

Saŝa Keremidĉieva estis aktiva anti-faŝistino, kun nobla karaktero. Ŝi estis



neŝancebleja batalantino por pli justa socio kaj abnegacie laboris por la triumfo de la libereco en nia lando.

Eternan pacon al la flama antifaŝistino-esperantistino Saŝa Keremidĉieva.

En ĵ. „**Kolarovgradska borba**“ (23. II. 1965) — artikolo de Cv. Todorov „Agado por la paco“ (konekse kun la kampanjo por kolektado de subskriboj al UNO).

En ĵ. „**Zarja na komunizma**“ (Loveĉ, 12. V. 1965) — en la rubriko „La esperantistoj — batalantoj por paco“ — artikoloj de Ilija Ivanov pri la kampanjo en Loveĉ, kaj de Ĥristo Vodeničarov kaj Cvetan Grozev — pri la kampanjo en vil. Borima.

En ĵ. „**Narodna kultura**“ (Sofia, 22. V. 1965) — en la rubriko „Nia arto tra la mondo“ — informo pri traduko de versaĵoj de Hr. Smirnenki kaj N. Vapcarov el Esperanto en la svedan lingvon.

En ĵ. „**Rabotniĉesko delo**“ (Sofia, 3. VI. 1965) — en artikolo „Kie oni produktas bulgarajn kraĵojn?“ — de T. Lambov oni mencias pri kraĵono „Esperanto“.

En ĵ. „**Ludogorska pravda**“ (Razgrad, 1. VII. 1965) — artikolo de C. M. „Ni korespondas kun la tuta mondo“ (pri la agado de „Juna pacbatalanto“ en Kubrat).

En ĵ. „**Septemvri**“ (St. Zagora, 6. VII. 1965) — artikolo de I. Deĉev „Esperanto kaj la internacia kompreniĝo“ (pri la kampanjo).

En ĵ. „**Narodna kultura**“ (Sofia, 7. VIII. 1965) — en rubriko „Mozaiko“ — informo „Internaciaj gazetoj („Monda kulturo“ kaj „Heroldo de Esperanto“) pri Bulgario“.

En ĵ. „**Veĉerni novini**“ (Sofia, 9. VIII. 1965) — informo „Amasaj turistaj kunvenoj sur Ljulin-monto kaj Vitoŝa-monto“ (mencio pri la turista festo ĉe montodomo „Esperanto“).

En la sama ĵurnalo (7. IX. 1965) — informo en la kroniko pri montodomo „Esperanto“.

En ĵ. „**Narodno delo**“ (Varna, 26. VIII. 1965) — informo pri E-kunveno.

En la sama ĵurnalo (18. IX. 1965) — informo en la kroniko pri organizo de ekskursoj.

En ĵ. „**Zarja na komunizma**“ (18. IX. 1965) — artikolo „Per la internacia lingvo“ (pri vizito de bulgara familio en Francio).

En ĵ. „**Oteĉestven glas**“ (Plovdiv, 21. IX. 1965) — informo pri la distrikta konferenco de la esperantistoj en Asenovgrad.

En ĵ. „**Narodno delo**“ (Varna, 22. IX. 1965) — informo pri E-kunveno.

En ĵ. „**Septemvri**“ (St. Zagora, 25. IX. 1965) — artikolo de I. Markova „Kun preteco en la batalo por paco“ (pri la kunveno en Kazanlâk, 25. IX. 1965) — artikolo de Iv. Zahariev — „Kunveno de la paco“ (kun prelego de N. Aleksiev).

En ĵ. „**Zarja na komunizma**“ (Loveĉ, 6. X. 1965) — artikolo de Stojko Fortunov „Lernu Esperanton!“

En ĵ. „**Zvezda**“ (Kjustendil, 9. X. 1965) — informo de C. Petkov, instruisto en vil. Rila, ke tie oni lernas Esperanton.

En ĵ. „**Zarja na komunizma**“ (Loveĉ, 16. X. 1965) — en la rubriko „La mondo ridas“ oni publikigas anekdotojn tradukitajn de K. Kalĉev, el „La praktiko“.

En la sama ĵurnalo (20. X. 1965) — artikolo de Ilija Ivanov „Inter la rumanaj esperantistoj“ (la aŭtoro rakontas pri sia gastado en Bukureŝto).

En ĵ. „**Trevnenski zov**“ (30. X. 1965) — anonco pri trimonataj E-kursoj.

E. ĵ. „**Rabotniĉesko delo**“ (1. XI. 1965) — informo pri la nova turista domo „Esperanto“ apud Orjaĥovo.

En la sama ĵurnalo (4. IX. 1965) informo „Vigla agado de la bulgaraj esperantistoj“ (pri la prelego de N. Kjuĉukov okaze de la 48-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, kaj de N. Aleksiev pri la 20-jara datreveno de UNO).

En ĵ. „**Septemvri**“ (4. IX. 1965) — informo de Iv. Zahariev, Bl. Dimitrov „Impresoj pri malproksima Japanio“ (pri la kunvenoj en St. Zagora, Kazanlâk kaj Ĉirpan kun oratoro R. Triĉkov).

En ĵ. „**Veĉerni novini**“ (6. XI. 1965) — anonco pri E-kunveno en Sofio kun prelego de Prof. D-ro Iv. Vasilev).

En ĵ. „**Iskârska komuna**“ (Mezdra, 7. XI. 1965) — „Per Esperanto tra la frataj socialismaj landoj“ — vojaĝnotoj de A. Anĉev kun tri fotoj (la aŭtoro rakontas pri la E-ferioj en Pollando). La vojaĝnotoj estas daŭrigotaj; kaj anonco pri E-kursoj.

En ĵ. „**Rabotniĉesko delo**“ (22. XI. 1965) — artikolo de D-ro T. Todorov „La vastaj eblecoj de Esperanto“ (konekse kun la kampanjo).

En ĵ. „**Narodno delo**“ (27. XI. 1965) — anonco pri E-amuzvespero.

En ĵ. „**Haskovska tribuna**“ (9. XII. 1965) — artikolo de Ĵ. Zaprianov „250 personoj lernas Esperanton“ (pri la E-kursoj en Dimitrovgrad).

En ĵ. „**Kolarovgradska borba**“ (4. XII. 1965) artikolo de Ĵ. Ĵeljazkov „Torrentoj“ (rakonto pri la E-kurso ĉe la lernejo en vil. Timarevo, reg. de Ŝumen).

En ĵ. „**Narodno delo**“ (15. XII. 1965) — anonco pri E-kunveno dediĉita al Zamenhof.

En ĵ. „**Rabotniĉesko delo**“ (18. XII. 1965) — artikolo de Iv. Slan kov „Esperanto kaj nia kleriga afero“.

La distrikta E-Komitato en Plovdiv eldonas stencile informan Bultenon kun organiza karaktero. Jam aperis du numeroj kun varia materialo. Niajn gratulojn.

ARGENTINO

Hector C. Diaz, Moreno 3230, Santa Fe — interŝ. PM kun Japanio, Sovetunio, Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario

BULGARIO

24 lernantoj el II-a gimnazio, Vraca, kiuj lernas Esperanton nedevige — dez. kor. kun ĉl pri sporto, muziko, literaturo, filmoj, kosmo, arto, flaŭro, faŭno kaj popolkutimoj. Volonte ili interŝanĝus: PK, PM, BK, revuojn, gazetojn, insignojn, fotojn de filmartistoj kaj prospektoj. Skribu amase amikleterojn al: Esperantogrupo „Verda Raketo“, II-a gimnazio, Vraca.

E-grupo el vilaĝo Marten, distrikto de Ruŝe, dez. kontakti kun junuloj el ĉl.

Ivan Zranĉev (30-jara instruisto), vilaĝo Rejanovci (Pernik) pri literaturo, PM, PK kun la tuta mondo.

Nikolaj Ljubenov Todorov, str. Hristo Botev bl. 2. vh. B, ap. 1, Marica — kun la tuta mondo. Respondo certa.

E-rondo en gimnazio „Lenin“, urbo Asenovgrad, dez. korespondi kun junaj geesperantistoj el la tuta mondo.

30 gekursanoj (17–40 jaraj) dez. korespondi kun la tuta mondo pri ĉt. Bonvolu skribi al kursgvidantino: S-ino Rajna Kasabova, str. „Kiril i Metodi“ 84, Ŝumen.

ĈEĤOSLOVAKIO

Zöld Fridrich, Košice, ul. Vystavby 1, kun bulgaroj pri diversaj temoj.

GERMANIO

Hans Ph. Gunkel, 06401 Zirkenbach 85 — la adreso estas nova.

HUNGARIO

János Abrahám (17 j. knabo) Mórahalom, VI. k. 66.

József Böröc (16 j. knabo), Mórahalom, IV. k. 128.

Mária Csillag (15 j. knabino), Kelebia, Petőfi u. 9.

Piroska Csiszár (16 j. knabino), Mórahalom, III. 11.

Judit Csonka (18 j. knabino), Mórahalom, Felszabadulás u. 14.

József Fazekas (16 j. knabo), Mórahalom, V. k. 4.

Eszter Fehér (15 j. knabino), Mórahalom, VI. k. 161.

Eva Ferenczi (17 j. knabino), Mórahalom, Tömörkeny u. 13.

Magdolna Céberics (15 j. knabino), Kelebia, Sztipios j. 40.

Gizella Kóródi (16 j. knabino), Mórahalom, Felszabadulás u. 56/b.

Imre Kóródi (15 j. knabo), Mórahalom, Felszabadulás u. 56/b.

Mária Masa (16 j. knabino), Mórahalom, VI. k. 148.

Erzsébet Matuszka (17 j. knabino), Kelebia, IV-es j. 11/a.

Katalin Mucsi (15 j. knabino), Mórahalom, Felszabadulás u. 39.

— Ilona Nagy (15 j. knabino), Mélykut, Felszabadulás u. 13.

Imre Nagy (16 j. knabino), Mórahalom, Dózsa u. 16.

Rozália Négyökrű (19 j. knabino), Mórahalom, Szegedi u. 56.

György Németh (15 j. knabo), Mórahalom, Szegedi u. 4.

Julianna Nyerges (16 j. knabino), Asotthalom, X. k. 1527.

Piroska Paplógó (17 j. knabino), Mórahalom, Honvéd u. 9.

Erzsébet Szücs (18 j. knabino), Mórahalom, Felszabadulás u. 21.

Julianna Szücs (15 j. knabino), Mórahalom, Danko u. 22.

Rudolf Tandari (18 j. knabo), Domaszék, 516.

Annamária Takács (16 j. knabino), Mórahalom, Felszabadulás u. 19.

Magdolna Tóth (17 j. knabino), Mórahalom, Felszabadulás u. 14.

— Judit Ürmös (16 j. knabino), Kelebia, Ady u. 123.

— Georgo Flender, Békéscsaba 5. Bessenyei u. 15, (dez. korespondi kun ĉl. pri ĉt.)

ITALIO

Romana Scarpatti (19-jara studentino de la belartoj) Via Orsolone 25 — Napoli, kun ĉl.

POLLANDO

Jerzy Czeremaga (16-jara lernantino), ul. Jas. Dolina 26-6/2, Sol-Wreszisz — kun ĉl. pri ĉt.

Kazimierz Hrominski, ul. Hufcowa 6, Miedzeszyn Nowy, Warszawa 94 — kun f-inoj (20–26 jaraj) el Nigra Marbordo.

Jozef Rogowski, Zawidów, ul. Wilcza nr. 26, pow. Luban Sl. — kun bulgaroj pri literaturo, Esperanto, PM kaj aliaj.

Jan Puzyrkiewicz, str. Staszica 29, Kwidzyn (woj. Gdanckie), dez. kor. kun bulgaroj, kolektas PM kaj BK.

SVEDIO

Nils Johansson, Norrtullsgatan 23, Holmgren, Stockholm V. A. — kun filatelistoj.

Bo Sandelin (studento) Varvadersvägen 6 B. 70, Lund — pri sociaj temoj.

ŜTATA UZINO POR FABRIKADO DE MAŜINOJ —
en urbo PAVLIKENI, Bulgario

PRODUKTADO DE:



Transpaletoj malaltliftaj
kun his-kapacito de 1000 kg

Minejaj vagonetoj


Konstru-kaj ceramik-
vagonetoj

Ĉenstabloj por la ŝuo-
industrio

Acetilenaj generatoroj —
malalta premo

Ŝtal-muldaĵoj por la elek-
troĉara industrio.

Al la interesigantaj
entreprenejoj kaj komercaj
organizacioj, ĉe eventuala
petskribo, la Uzino
sendas tuj senpage
prospektojn pri
la specoj kaj
la teknikaj
indicoj
de la
fabrikataj
maŝinoj.



ŜTATA FABRIKO
POR ALUMETOJ — ĉe Fervojestacio KOSTENEC

POR LA ENLANDA LA EKSTERLANDA
MERKATOJ


al la klientoj

PROPONAS

EL SIA

PRODUKTADO DE:

SEKURE-IMPREGNITAJ ALUMETOJ
LIGNORABOTAĴO POR ENPAKADO DE
VAROJ
LA FABRIKAĴO „BLIND“
LIGNAJ PINGLOJ POR DENTPURIGO




FUMIGAĴOJ KONTRAŬ PRUJNO KAJ INSEKTOJ
ABELUJOJ KAJ TIES APARTENAĴOJ
FAJRERANTAJ ILUMIN-KANDELETOJ
VENT-IMUNAJ KAJ ALISPECAJ ALUMETOJ

Redakta komitato: Kiril DRAŜEV, Dimitr ĴDRAKOV, Emil KEREMIDĈIEV, Atanas LAKOV,
Ivan SARAFOV (ĉefredaktoro), Simeon D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV
Adreso de la redakcio: Sofio, postkesto 66 Tel. 3-26-82

ŜTATA UZINO POR FABRIKADO DE MAŜINOJ „POBEDA“ — SLIVEN,
BULGARIO

PRODUKTADO DE:



Teksmaŝinoj;

Kardmaŝinoj por longa
lanfadenaro;

Volvomaŝinoj;

Apretur-maŝinoj;

Lavmaŝinoj

kaj

aliaj specoj de teksmaŝinoj kaj
ties rezervaj partoj —

por la enlanda kaj la eksterlanda merkatoj

